

eLIBRO

Paul Neergaard

Fremdvortoj en esperanto



INKO



Paul Neergaard

FREMDVORTOJ EN ESPERANTO

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

*Noto: Bonvolu atenti, ke la origina
libro aperis en 1933 kaj ke esperanto multe
evoluis de post tiu jaro.*

ISBN 91-7303-125-9

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

SEPTEMBRO 2001

ANTAŬPAROLO

La tasko de la esperantistoj estas duflanka: je unu flanko socia, je la alia pure lingva. Ĝi estas direktita eksteren — al la neesperantista publiko — en la propagando por pligravigi la rolon de la lingvo kiel socian faktoron. Kaj ĝi estas direktita internen — al la lingvo mem, kies kontentigan funkcion kiel teknikan kaj literaturan komunikilon devas prizorgi ĝiaj uzantoj. El la projekto "Lingvo internacia" ellaboriĝas la lingvo esperanto per kolektiva kreado de esperantistaj amasoj. La evoluo de la naciaj lingvoj okazas pli malpli hazarde sen alia gvido ol la kutimo kaj la tradicioj, dum la bazo de la evoluo en la universala lingvo estas farita tiel simpla, ke eĉ por la granda nelingvistika publiko estas sufiĉe facila afero sekvi rekte la vojon de logiko, racio, lingva ekonomio kaj laŭreguleco. Necesas nur montri la danĝeran influon de la neraciaj, anarkie kreiĝintaj malnovaj lingvoj. Utilas sisteme akcenti la preferindon de la raciigita esperanta sistemo antaŭ la arbitra sistemo de la malnovaj idiomoj. Tiel kaj nur per tia klerigado al la uzantoj de la planlingvo oni zorge atentigas la lingvan flankon de la tasko kaj konservas la tute konscian kaj malblindan evoluon de tiu lingvo.

Konforme al tio ĉi mi en la jena verketo provis fari gvidilon pri esperantigo de fremdvortoj laŭ la 15-a regulo, sinoptike pritraktante la diversajn konsiderojn, kiujn oni devas fari en la aplikado de tiu regulo.

Bedaŭrinde estis al mi neeble kontentigi min per sufiĉe da materialo pri la demando, ĉar neniu sufiĉe ampleksa esperanto-biblioteko estis al mia dispono. Ankaŭ por ne trograndigi la eldonkostojn mi rezignis je pli profunda pritrakto de kelkaj temoj, al kiuj indus pli da atento ol tiu, kiun mi povis doni per la prezento de tiu ĉi konciza studo. Oni tial do ne rigardu mian verketon kiel plene detalan pri la pritraktita temo.

Kopenhago, januaro 1933.

PAUL NEERGAARD

ENKONDUKO

La 15-a regulo: La tiel nomataj vortoj fremdaj, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

Partoprenas en la granda ĝenerala evoluo de la homa kulturo ankaŭ la evoluo de la lingvo. Tiu homo, kiu antaŭ jarmiloj vivis en la sovaĝa praarbaro, esprimis sin per simpla lingvo konforma al la simpla vivmaniero de la tiama tempo. Kaj hodiaŭ, kiam ni kuras en stratoj inter altegaj ŝtonloĝejoj, flugas super lando kaj maro kaj interparolas telefone de kontinento al kontinento, ni esprimas la melodiojn de nia plilongiĝanta pensoskalo per lingvo konforma al la kulturo de la nuna tempo. Per la ĉiutaga funkcio en parolo kaj skribo la lingvo ricevas iajn esprimojn, iajn frazojn, kiuj frapas la orelojn per sia bonsoneco kaj elokvento aŭ aliel plaĉas kaj oni akceptas ilin por la ĝenerala lingvo. Tiel okazas, ke lingvo ekposedas stilon, spiriton, tiel okazis, ke ekz. la franca lingvo, kiu tra jarcentoj kolektis abundon da eŭfemismoj, fariĝis la lingvo de ĝentilo kaj afablo. Samtempe la evoluo de la scienco kaj tekniko daŭre devigas krei novajn vortojn el elementoj indigenaj aŭ frem-

daj — kaj esprimoj ŝanĝiĝas en formo aŭ signifo. La evoluon de la frazoj, parolturnoj, de la stilo kaj per tio parte de la "spirito" de la lingvo, oni eble povas nomi la **evoluo per la sintakso**, dum la naskiĝo de vortoj (fakaj, ĵargonaj k.a.) aŭ ŝanĝiĝo de vortoj en formo (ekz. mallongiĝo, simpliĝo) aŭ en signifo (kreiĝo de eŭfemismoj, metaforoj, katakresoj k.t.p.) apartenas al la **evoluo per la vortaro**. Tiun ĉi lastan tuŝas la demando pri fremdvortoj, kiun ni ĉi tie devas preparoli.

LA NATURO KAJ LA FONTOJ DE LA FREMDVORTOJ

1. Difino de fremdvorto

La konata angla lingvisto profesoro Collinson donas la sekvantan klarigon pri fremdvortoj: "Ĉiu lingvo posedas provizon de tiel nomataj fremdvortoj t. e. vortoj, kiuj ne estas indiĝenaj sed pruntitaj. En la moderna lingvo kun longa tradicio, tiaj fremdaj elementoj ne ĉiam estas facile diferencigeblaj de la hejmaj, pro tio ke ili enkondukiĝis sufiĉe frue por plene adaptiĝi al la ĝenerala evoluado de la lingvaj sonoj. La germanaj filologoj faras utilan diferencigon inter tiaj asimilitaj vortformoj, kiujn ili nomas Lehnwörter t. e. pruntovortoj (ekz. *Fenster, Mauer*, kiuj devenas respektive de latina *fenestra* kaj *murus*, sed aspektas tute germane) kaj la pli modernaj vortoj, kiuj ofte konservas la karakteron de fremda sonado kaj akcentado, do nomiĝas Fremdwörter t. e. fremdvortoj (ekz. germ. *Courage, Perron* k.t.p. el la franca)."

Tiel oni malfacile povas diferencigi en esperanto, ĉar oni prave povas pretendi, ke tiu juna lingvo konsistas **nur** el pruntitaj vortoj. Kiel **fremdvortojn** oni en esperanto konsideras la t.n. internaciajn vortojn, sed klare limigi de la ĝeneralaj vortoj tiujn fremdvortojn, tiujn internaciajn vortojn, tio estas praktike tre malfacila. Laŭ ĝenerala difino vorto internacia estas vorto komprenebla de la plimulto de la indoeŭroplingvanoj, kaj laŭ tiu difino, kiu estas ĝenerale aprobita,

pravigata per la tutmonda influo de la grekolatina civilizo, ni nun volas pritrakti nian aktualan problemon.

2. Difino de internacieco

Internacieco laŭ la supre menciita difino do estas afero tre relativa. La vortaro estas vivanta — daŭre moviĝanta. Vortoj naskiĝas, mortas kaj renaskiĝas kaprice. Ili pasas de unu lingvo en alian — de unu sociklaso en alian, ricevas alian formon — alian prononcon — alian signifon. Samtempe estas malfacile aŭ praktike neeble konstati la nombron de personoj, kiuj konas iun pritraktatan vorton. Ni jen rilatas al vivanta, organika materialo, kiu posedas la diversan kaj la multon de la naturo.

Multaj novaj internacie konataj esprimoj estas enkondukataj en la lingvon per fakanoj, ĉu sciencistoj, ĉu teknikistoj, kiuj uzas ilin kiel terminojn en pli malpli malvasta rondo de samfakanoj. Multaj el tiuj terminoj fariĝas poste ĝenerale konataj — tiel ekz. *telefono*, *radio*, *atomo* eniris la ĝeneralan lingvon.

Aliel oni alprenas fremdvortojn por doni pli delikatajn esprimojn anstataŭ jam ekzistantajn vulgaraĵojn, ĉu por atingi pli grandan efekton, ekz. en la germana lingvo la franca *brillant* anstataŭ *glänzend*, *ausgezeichnet*, aŭ por doni pli subtilan nuncon, ekz. angla *gentleman* (etimologie "altranga viro") por prezenti ideon de "viro kun noblaj ecoj de altranga viro", ĉu por eŭfemisme esprimi ideon vulgaran, ekz. por la vorto *necesejo* aperas en diversaj lingvoj aro da eŭfemismoj: *Closet*, *Retirade*, *Lokum*, *W.C.*, *Toilette* k.t.p. (Cetere mi ankaŭ tion ri-

markis en esperanto: afabla kaj gastama samideano, ĉe kiu mi estis tranoktonta, montris al mi diskrete la — "ĉambreton"!).

Provante grupigi tiun multspecan materialon de la internaciaj vortoj laŭ tio en ilia naturo, kio iel havas signifon por la esperantigo, oni povas proponi klasifiki ilin jene:

1) laŭ senco.

2) laŭ formo.

laŭ deveno: A: el mortintaj lingvoj (latina, greka).

B: el vivantaj lingvoj.

laŭ devenigo: a) laŭ grafio.

b) laŭ prononco.

3. Internacieco laŭ senco

Internaciaj vortoj ofte alprenas diferencajn sencojn en la diversaj lingvoj, kvankam la formo restas la sama. En esperanto, kie la signifo de fremdvorto nature estas influata de la diversnacieco de ĝiaj uzantoj, tio povas kaŭzi iom da miskompreno. E. Privat skribas pri kelkaj tipaj kazoj: "... oni ne toleru, ke *akademio* signifnu por francoj korporacion de scienculoj, por ĉeĥoslovakoj muzikvesperon kaj por usonanoj privatan mezlernejon ... *Kontroli* ne devas signifi por angloj superregi kaj por francoj superekzameni. *Eventuale* ne rajtas egali por francoj eble kaj por angloj okaze ..." kaj frapantan ekzemplon li donas: "Idistoj povas ĝojegi je la mirinda "internacieco kaj tujkomprenebleco" de la jena frazo: *La ministroj kontrolis la tutan Bostonan konvencion*, sed mi preferas aŭdi, ke "la evangeliaj pastroj regis la tutan kongresejon en Boston per

sia influo” aŭ ke ”la registaranoj atente tralegis la tutan tekston de la Bostona interkonsento”.”

La signifon de fremdvorto en esperanto decidigas kiel en ĉiu alia lingvo — la ĝenerala uzado. Raporto de Grosjean-Maupin precizigas, ke **oficialigo** de internaciaj vortoj servas por ”fiksi kaj internaciigi ilian signifon.”

4. Internacieco laŭ formo

Internacieco de vortoj el mortintaj kaj vivantaj lingvoj

Por trovi esprimon de ideo uzota en la ĝenerala lingvo ni povas elekti aŭ antikvalingvan fontvorton (t. e. vorto el la t.n. scienca lingvo) aŭ modernalingvan fontvorton (t. e. vorto el la t.n. komuna lingvo de iu nacia lingvo). La limoj inter tiuj du kategorioj ne estas klare distingeblaj, ĉar la sciencaj vortoj povas esti pli malpli uzataj en la komuna lingvo. Se oni nur atentus la sciencan esprimaron, oni povus krei tutan lingvon internacian el la antikvaj lingvoj, ĉe kiuj la scienco prunteprenis sian vortaron. Ekz. esprimo kiel *pueril* estas nur konata de malgranda intelektularo en ĉiu lando, ĝi do estas internacia vorto komprenebla por intelektuloj, sed por la grandaj popolamasoj ĝi estas nekonata. Tial Zamenhof elektis la vorton *knabo*, kies signifon malgraŭ ĝia neinternacieco certe konas pli granda nombro da personoj ol tiuj, kiuj konas la signifon de *puero*. Alian ekzemplon donas Camille Aymonier: ”... En esperanto ni havas la vorton *ŝviti*. La radiko estas plej internacia, ĉar ĝi estas germana kaj angla: *schwitzen*, *sweat*. Ido anstataŭigas ĝin per *sudor*, pro la argumento, ke la angloj po-

sedas *sudorific*, kiu estas scienca, medicina vorto kaj pri kiu la popolo sendube ne atentus.”

A Fremdvortoj el mortintaj lingvoj

La sciencaj terminaroj konsistas grandaparte el latinaj kaj grekaj elementoj pro la centjara apliko de la latina lingvo kiel internacia lingvo de scienco. La granda utilo de tiuj du lingvoj konsistas unue el la alikutimigita internacieco de iliaj esprimoj, due el tio, ke la vortoj, ofte kunmetaĵoj, kreeblaj per tiuj lingvoj povas esti uzataj kun proksimumaj kvankam iom diferencaj signifoj ol la respondantaj kunmetaĵoj nacilingvaj. Se en nia ekzemplo *kunigo*, *kunmeto* reprezentas la nacilingvajn formojn, ni havas:

latinaj radikoj: *komposto*,

kompono (4 signifoj laŭ PV),

kompoto,

kompozito (botanika termino),

kompozicio;

greka radikoj: *sintezo* (5 signifoj laŭ PV).

Ĉiu el ĉi tiuj vortoj reprezentas ideon de iu speciala kunmetaĵo: tipografa, muzika, kulinara k.t.p.

1 ESPERANTIGO DE FONTVORTO

Esperantigante internacian vorton oni konsideras ĝian internaciecon grafian kaj prononcan kaj — kiam oni devas elekti fundamentan formon el pluraj vortoj — la gramatikan naturon de la fontvorto.

a) Devenigo laŭ grafio

Fremdvortoj devenantaj el mortintaj lingvoj plej ofte havas la saman ortografion en la diversaj lingvoj, kvankam la prononco de la vorto estas tute malsama. Ekz. *mutation* en angla, franca, germana, k.t.p. lingvoj kun diferencaj prononcoj en la diversaj lingvoj fariĝas en esperanto sendiskute: *mutacio*.

b) Devenigo laŭ prononco,

kion oni relative malofte aplikas. Tio ekz. okazas transskribante c aŭ q al k: *konkludi* (concludo) *kvadrato* (quadratus), x al ks en *ksilofono* (xylophon) k.a. Antaŭ kelkaj jaroj oni diskutis en "Heroldo de Esperanto", ĉu oni prefere uzu la laŭprononcan formon *radjo* anstataŭ *radio* en la signifo de senfadena telefonio, kaj oni en tiu periodo (ĉ. 1928) sufiĉe ofte trovis tiun formon, sed poste ĝi ŝajne tute malaperis. — Same oni proponis (sed rifuzis) la formon *orjentiĝi* anstataŭ *orientiĝi*.

c) Devenigo laŭ gramatika naturo

La devenigotaj formoj estas distingeblaj laŭ sia gramatika naturo. Kiel ni montris per la ekzemplo *kompono*, *komposto*, *kompoto*, k.t.p. estas eble per unu vorto krei plurajn nuancojn. Tiel oni povas laŭvole devenigi vortojn ekz. el origina verba aŭ substantiva formo. Oni uzis paralele *proponi* kaj *propozi* (Sentis: "Vortoj propozataj"), *eksponi* (fotografia termino) kaj *eksprozi* (= ekspozicii), k.t.p. Laŭ la 15-a regulo "ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur unu vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto." Restas do la demando, **kiun** vorton oni konsideru kiel fundamentan. Kiam pluraj nuancoj ne es-

tas farendaj, estas sendube plej racie devenigi verbradikitan vorton el la origina verba formo, substantivradikitan vorton el la origina substantiva formo kaj adjektivradikitan vorton el la origina adjektiva formo. Tiel ekz. el la verbradika *hipnoti* (hypnotisieren) oni havas la vorton *hipnoto* (Hypnose) kaj ne *hipnoso* aŭ *hipnozo* kun respondantaj verbaj formoj. El adjektivradikaj *impotenta*, *kompetenta* oni derivas *impotent(ec)o*, *kompetent(ec)o* kaj ne inverse el *impotenco*, *kompetenco* la derivaĵojn *impotenca*, *kompetenca*. El substantivradika vorto *asonanco* oni kreas la verbon *asonanci*. Se oni estus elektinta la verbradikitan formon *asoni*, kiu formo estas malpli internacia, oni estus povinta derivi *asono* (ago asoni) kaj *asonaĵo* (= asonanco). Ne-konsekvenca kun tio Ch. Baudoin faris el la substantiva formo de verbradika vorto sekvantajn du nuancojn: *sugesti* (suggérer, anregen: estigi sugestion), *sugestii* (suggérer, suggestionner, suggerieren, einflüstern: estigi sugestion ĉe paciento) — (*Sugesto* estas laŭ la aŭtoro "neteknika vorto, ago per kiu oni esprimas konsilon aŭ ideon ne aserte, sed tiel, ke la persono ĝin facile akceptu. *Sugestio*: teknika psikologia kaj medicina termino. Realigo de ideo pere de subkonscia procezo"). Laŭ gramatika naturo oni povus devenigi *sugeri*.

La praktiko cetere montras, ke oni tre ofte ne devenigas laŭ gramatika naturo de la fontvorto, sed elektas kiel devenigan formon tiun, kiu estas internacie plej uzata. Tiel oni diras *kondolenci* kaj ne *kondoli*, *propagandi* kaj ne *propagi*, ĉar la substantiva formo estas la plej ofte uzata formo en la diversaj lingvoj. Same *konsekvenca* anstataŭ *konsekventa*, *kolizii* anstataŭ *kolidi*. Ni reiparolas la praktikon pri tio en la ĉapitro "analizado de fremdvortoj laŭ la starigitaj principoj."

ĉ) *Devenigo diversa por eviti ĝenajn homonimojn*

Kiam oni pro miskomprenblo devas forigi homonimojn, oni povas devenigi pli ol unu vorton el la sama fontvorto. Forigo de homonimoj estas farebla diversmaniere:

1) Oni povas devenigi unu vorton laŭ substantiva, alian laŭ verba formo de la originvorto. Ekz. *opero* (laŭ verbo), *operacio* (laŭ substantivo).

2) Oni povas devenigi unu vorton laŭ infinitiva, alian laŭ supina formo de la originvorto. Ekz. *ago* (agere, infinitivo latina), *akto* (actum, supino latina).

3) Oni ŝanĝas, aldonas aŭ ellasas literon. Ekz. *ekonomio* kaj *ekonomiko* (prieconomia scienco), *tabulo* kaj *tavolo*, *albumino* kaj *albumeno*, *sugesto* kaj *sugestio*.

4) Oni aldonas aŭ ellasas silabon. Ekz. *koro* kaj *koruso* (= ĥoro, propono de Verax), *tablo* kaj *tabulo*, *ordo* kaj *ordeno*.

2) La nuancigeblo per antikvalingvaj elementoj

En la origine kunmetitaj grekolatinidaj fremdvortoj simplaj en esperanto kiel *grafologio*, *fotografio*, *teologio*, k.t.p. oni renkontas ripete la samajn vortetojn kaj afiksojn, kiuj formas tiujn kunmetaĵojn. Koncerne al tio ĉi estas tre nature proponi, ke oni diselementigu tiujn kunmetaĵojn, oficialigu la apartigitajn vortojn kaj per tio ŝparu la lernadon de la kunmetaĵoj. Oni jam multfoje faris tiajn proponojn. Tiel ekz. en Ido oni faris multe pli vastan aplikon de afiksoj ol en esperanto. Kiomvaste oni devas uzi tian vortŝparigan afiksantan sistemon, tio estas sufiĉe malfacile konstati — tro vasta aplikado komplikiĝas la vortfaradon kaj per tio malfaciligas la lernadon de la lingvo.

Entute pri tiuj supre aluditaj vortetoj kiel *graf-*, *-olog*, *te-*, *foto-* k.t.p. oni certe devas serĉi la solvon en la senco de la vortoj. Se vorto tiaspeca ne havas ekvivalentan esprimon en esperanto, ni jam havas bazon por enkonduki ĝin kiel memstaran radikon, sed se jam ekzistas tia, oni pravas heziti. La vorto *grafio* havas alian signifon ol simpla skribo tiel, ke "lumskribo" ne taŭgas por *fotografio*. Male *teo-*, ĉar ni jam havas la vorton *dio*. Ni do havas du kategoriojn:

En la **1-a kategorio** la vortoj alprenis alian signifon en la moderna tempo, tiel ke *elektro* ne plu havas sian originan signifon sukceso, *grafio* ne plu skribo k.t.p.

Vortoj de la **2-a kategorio** *teo* (= dio), *-ologi* (= i.a. scienco), *-toro* (= isto aŭ ilo) k.t.p. jam havas ekvivalentaĵojn en esperanto kaj tial plej ofte prefere devas resti kiel **partoj** de radikoj — kvankam ili ĉiam restas kvazaŭ "pseŭdoradikoj" en vortoj kvazaŭkunmetitaj kiel *teozofio*, *teologio*, *mono-*, *poli-*, *pan-*, *-teismo* k.t.p. Tamen povas esti pravigeble uzi la vortojn de la dua kategorio kiel memstarajn vortojn — se oni donas al ili **specialan sencion**, ĉar per tio oni ja envicigas ilin kun la vortoj de la unua kategorio.

Dro Lippmann trovas vojon al plinuancigo dirante ke la formoj devenigitaj el diversaj lingvoj ebligas eĉ delikatajn diferencigojn:

Ekz. "El radiko greka *teismo* = kredo je persona dio.

El radiko latina *deismo* = kredo je dio per raciokaŭzoj.

El radiko esperanta *diismo* = kredo je dio ĝenerale."

Iomgrade oni certe povas iri laŭ tiu vojo. Kiel latindevenaj *kompono*, *lingvistiko* kaj grekdevenaj *sintezo*, *filologio* havas diferencajn sencojn, kiel greka *karpologio* estas scienco pri fruktoj kaj latingreka *pomologio* estas hortikultura fako pri

fruktoj, tiel kompreneble povus esti kreataj miloj da similaj nuancoj, — sed en la praktiko la plena ekspluato de tiu nuan-
cigkapablo de esperanto estas ne facila, ĉar interkonsento
inter ĉiuj uzantoj de la lingvo pri tiuj ofte tre subtilaj nuan-
coj ja estas necesa.

3) HIBRIDAJ VORTOJ

Inter la fremdvortoj oni tre ofte renkontas la t.n. hibridajn vortojn, t. e. vortoj, kiuj estas formataj el radikoj apartenantaj al diversaj lingvoj. Tiel ekz. *aŭtomobilo* konsistas el greka kaj latina radikoj. Ni jam supre menciis, ke respondantaj esperantaj hibridaj kunmetaĵoj kiel *teismo*, *deismo* k.t.p., ebligas pli grandan nuancigon, kaj se tiaj hibridaj formoj ne kaŭzas miskomprenon, oni ne bezonas ilin timi. Ekz. *amfi'teatro*, *hemi'sfero*, *administr'acio*, *kompens'atoro*, kiuj estas hibridaj vortoj, ĉar ili estas kunmetitaj el esperanta radiko kun alilingva radiko aŭ finaĵo, estas ĉiuj bonaj, ĉar senpere kompreneblaj. Ili estas tute naturaj, konformaj al la kutimo, al la internacieco.

Sed se ni kreas hibridajn formojn kiel *kunverĝi* anstataŭ *konverĝi*, *elpoz* anstataŭ *ekspoz*, *bijara* anstataŭ *dujara*, ni rompas la kutimon. Kompreneble formoj kiel *kunverĝi*, *elpoz*, *bijara* estas egale koncizaj, bonsonaj k.t.p. kiel la respondantaj formoj, sed ili estas malpli internaciaj, ne pli simplaj kaj tial malbonaj.

Kelkaj vortoj kiel *molekulo*, *kinino*, *barbaro*, k.t.p. ŝajnas esti hibridaj havantaj finaĵon, kiu ŝajnas esti afikso. Zamenhof forigis multajn el tiaj kvazaŭhibridaj vortoj: li aŭ ŝanĝis literon, ekz. *pendolo* (pendulus), *planedo* (planet), aŭ mallongigis vorton, ekz. *taĉmento* (detachment), *krepusko* (crepuscule) (R.

de l'Isle). Tamen tro multe timi miskomprenon pro eblaj homonimoj oni ne bezonas, kion montris multfoje la praktiko.

Tiel antaŭ la milito oni hezitis en la uzado de *riprezenti* kaj *reprezenti*, — la lasta formo venkis.

B Fremdvortoj el vivantaj lingvoj

El tiaj vortoj konsistas plejparte la vortaroj de la praktikaj fakoj, ofte ĉerpitaj el tiu lingvo, kies uzantoj ludas ĉefan rolon en la koncerna fako. Ekz. anglaj sportesprimoj pro la angla sportintereso, italaj bankterminoj kaj muzikterminoj, — k.t.p.

ESPERANTIGO DE FONTVORTO

Dum el mortintaj lingvoj oni plej ofte devenigas laŭ origina grafia formo pro ties pli granda internacieco, oni el vivantaj lingvoj tre ofte preferas devenigi laŭ la prononca formo, ĉar la vortoj devenigotaj, kiuj en multaj okazoj apartenas al praktikaj aŭ metiaj fakoj, ordinare estas pli ofte prononcataj ol skribataj. Tiel ekz. en la moderna tempo la anglaj radioterminoj *broadcast*, *speaker* k.t.p. eniris en multajn naciajn lingvojn kun la proksimuma prononco originlingva. Tiajn vortojn oni preferas esperantigi laŭ prononca formo: *brodkasti*, *futbalo*, *laŭteniso*, *intervjuo*, *ŝoseo*, *vodvilo*, *kamariljo* (Verax), *baseno*, *edelvejso* k.t.p.

Parolante pri devenigo laŭ prononca formo oni devas konscii pri la relativeco de tiu esprimo. *Futbalo* ne estas plene laŭprononca — oni tre ofte ankaŭ iomgrade atentis la grafion. Oni ne rigore transskribas *futbolo*, *edelvajso* k.t.p. Estas neeble doni ekzaktajn regulojn pri transskribado en esperan-

to, en kio regas ia lingva instinkto. Konsiderante ankaŭ la grafion oni faris (laŭ PV) *apaĉo* (fr. apache) kaj ne *apaŝo*, kontraŭe *ataŝeo* (fr. *attache*) plene laŭ prononco kaj ne la analogan *ataĉeo*.

POSTULOJ POR LINGVA BONECO

Karakterizas la tutan homan celadon la deziro atingi la kiel eble plej grandajn rezultojn kun la kiel eble plej malgranda peno. Prijuĝante la bonecon de teknika eltrovaĵo oni ĝuste konsideras kiagrade tiu ĉi obeas la leĝojn de **maksimuma efiko kaj minimuma balasto**. Tute same pri lingva boneco. Prijuĝante aŭ celante ĝin, konvenas konsideri la sekvantajn postulojn:

Maksimuma efiko:

- a) Postulo de precizo.
- b) Postulo de parola klaro.

Minimuma balasto:

- a) Postulo de lingva ekonomio:
 - a) Postulo de vortara ekonomio.
 - b) Postulo de vorta ekonomio.
- b) Postulo de minimuma memorŝarĝo.
 - a) Postulo de jama kono: laŭkutimeco (internacieco, kunmetaĵoj signife analogaj kun respondantaj nacilingvaj kunmetaĵoj).
 - b) Postulo de laŭreguleco: konformo al la sistemo, analogio en la formo (ekz. analogia transskribado).
 - c) = a) a).

Por plenumi tiujn ĉi postulojn pri lingva boneco de esperantigata vorto ne antaŭe esprimita en esperanto, oni povas starigi la principojn, kiujn oni trovas en la sekvanta ĉapitro.

STARIGO DE PRINCIPOJ APLIKEBLAJ JE ELEKTO DE ESPERANTO-FORMOJ DE FREMDVORTOJ

1. Principo de vortara ekonomio (*principo de oportuno*)

Oni zorge devas esplori, ĉu kunmetaĵoj el jam oficialigitaj elementoj sufiĉos. Esperanto reprezentas inter la lingvoj la funkciismon: oni devas kiel jam menciite atingi la maksimuman efikon kun la minimuma balasto. Elokventa kunmetado de oficialaj radikoj estas centoble pli valora ol senripoza fabrikado de neologismoj.

G. Waringhien trovis tri ĉefajn motivojn, kiuj estas konsiderindaj, kiam oni volas krei novajn esprimojn en esperanto:

”a) La kunmetita vorto estas tro longa: *malhumilo, animpremece, favorkoreco, kuntiriĝi, brutaro* (anstataŭ *orgojlo, angoro, graco, ŝrumpi, grego*).

b) La kunmetita vorto estas maltaŭga, dusenca: *klarigi* (1. igi klara, 2. *ekspliki*: oni povas ekspliki problemon, kaj tute ne igi ĝin klara), *kulpigi* kaj *senkulpigi* (ili logike devus signifi: *kondamni* kaj *absolvi*; fakte ili signifis *akuzi* kaj *e(k)skuzi*), *vastigadi* (1. igi vasta, 2. *propagandi*); *paroladi* (1. multe paroli; 2. *oratori, diskursi*), *rapidi* (1. esti rapida; 2. *hasti*).

c) La kunmetita vorto estas psikologie malkonvena pro la trouzado de la prefikso *mal*: *malzorgi, mallarĝa, malkondamni, malvirtema, malĝojigi* ktp. (= *neglekti, strikta, absolvi, perversa, aflikti* — ĉiuj zamenhofaj krom la unua).”

Verŝajne tiu punkto c) trovas iom da kritiko ĉe la pli lingvokonservativaj elementoj de la esperantistaro. Sed pretendante, ke esperanto havas kaj devas havi **artan, literaturan** valoron, oni ĝuste pro tio devas meti tiajn psikologiajn vidpunktojn eĉ ne nur koncerne al la menciita kategorio de "mal"-vortoj sed ankaŭ en iaj aliaj kazoj. Sed tio postulas singardon, por ke la vortaro de la ĝenerala lingvo ne tro ŝveliĝu. Cetere oni iomgrade devas konsideri la literaturan lingvon kiel fakan lingvon havantan la rajton posedi vortojn, kiuj nepre ne ŝarĝu la vortaron de la ĉiutaga vivo.

En la enkonduko de "Komerca vortaro de Esperanto" (Kreuz kaj Mazzolini), oni faras la jenajn konsiderojn pri la principo de oportuno kiel lingvekonomia faktoro:

"a) Kreo de nova vorto aŭ esprimo estas necesa, se temas fakte pri ideo ne-esprimita ĝis nun aŭ kiu per si mem reprezentas apartan konceptaĵon.

b) Se por certa faka konceptaĵo en iu nacia lingvo ekzistas aparta vorto aŭ esprimo, tio ne nepre necesigas la kreon de speciala esperanta esprimo.

c) Vortoj kun unusignifa senco en la komuna lingvo ne malebligas ilian metaforan uzon en la diversaj kampoj de la faklingvo.

ĉ) La ebleco sin esprimi per naturaj esperantoformoj ne malhelpas la uzon de veraj internaciaj terminoj kaj formoj ĝenerale uzataj en la praktiko (paragr. 15), sed ili devas adaptiĝi al la karaktero de esperanto.

d) Ĝuste la principo de oportuno postulas eviton de superflua balasto en la faklingvo."

(El Bulteno de Internacia Scienca As. E.)

Fine ni aldonas saĝe admonajn parolojn el la Lingva Akademio: "... Al la esperantistaro, en kies manoj nepre restas la sorto de nia lingvo, la akademio konsilas, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki kaj, per uzo, aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭigebla per taŭga vorto, ĉu fundamenta, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata ... Kelkaj esperantistoj forgesante, ke la netuŝebleco de la fundamento estas baza, esenca kaj principa regulo, malprave asignas al la 15-a regulo amplekson kaj signifon, kiun ĝi tute ne havas. Efektive la 15-a regulo estas nur malĉefa, akcesora, pleniga regulo, kaj, se oni rigardas ĝin kiel ĉefan kaj bazan principon de la lingvo, kiu kontraŭstaras al la netuŝebleco de la Fundamento, kies nepran necescon konstante proklamis Zamenhof, kaj kiu permesis senliman ŝanĝadon de ĉiuj radikoj de nia vortaro, eĉ de tiuj, kiuj troviĝas en la Fundamento, tiam oni konfuzus la principojn de Esperanto kun tiuj de Ido, kiuj, malgraŭ la malvera aserto de la idistoj, estas tute kontraŭaj al tiuj de Esperanto".

(Oficiala Klasika Libro de Esperanto.)

2. Principo de internacieco

Por la minimuma balasto de la memoro oni devas elekti tiujn vortojn, kiuj estas plej konataj t. e. plej internaciaj. Internacia vorto laŭ ĝenerala difino estas vorto komprenebla al la plimulto el la indoeŭroplingvanoj. Ne la nombro da lingvoj enhavantaj iun vorton, sed la proksimuma nombro da personoj ĝin konantaj devas esti decida por la grado de internacie-

co. Komparu ekzemplojn *puero-knabo* kaj *sudor-ŝviti* (pĝ. 10) kaj vidu plue pri la diversaj postuloj pri internacieco, kiujn faras diversaj lingvouzantaj medioj, (pĝ. 26: Rilato inter la sciencia-teknika kaj la komuna lingvoj). Fine, atentu pri la internacieco de la senco (pĝ. 9). Vorto kiel *konvencia* estas internacia laŭforme, sed tute ne laŭsence.

3. Principo de koncizo (*principo de vorta ekonomio*)

Ju pli koncizaj la radikoj, des pli kunmeteblaj ili estas, kaj des pli esprimriĉa estas la lingvo. En la naciaj lingvoj — precipe en la moderna tempo — oni povas rimarki la tendencon al mallongaj, koncizaj esprimoj. Konata pariza fervojsocieto oficiale nomiĝas "La compagnie de chemin de fer Nord-Sud". La ĉiutaga parolo mallongigis la nomon kaj restis nur "Nord-Sud". La vorto *piano* estas mallongigo de "un clavecin à forte et piano", k.t.p. Same ni diras *Satano* anstataŭ "ano de Senacieca Asocio Tutmonda". *Kominterno* anstataŭ "Komunista Internacio", *kino* anstataŭ kinematografo k.t.p. Kio en la naciaj lingvoj estas sekvo de sana instinkto, tio devas en la artefarita lingvo esti konscia racia celado.

RIMARKO: Komparu la principon de koncizo kun la principo de sufiĉo starigita de René de Saussure. La principo de sufiĉo koncernas al **kunmetado de vortoj** — postulas eviton de nenecesaj vortoj en kunmetaĵo. (Ekz. *koncizeco*, evitebla la sufiksa vorto *ec'*, ĉar konciz- jam enhavas la ideon de *ec*). La principo de koncizo koncernas al **formo de simpla vorto**,

postulas eviton de nenecesaj silaboj aŭ literoj. (Ekz. *intellektuala*, forigenda l kaj ual).

4. Principo de laŭreguleco (*principo de analogo*)

Esperantigante vorton oni devas kiom eble plej multe konservi unuformigajn karakterizaĵojn de la fontvortoj uzante analogan transskribon, kaj devenigante kiom eble plej multe laŭ gramatika naturo de la fontvorto. Ĝeneraligo, unuformigo estas la vojo al simpla. Kiam Zamenhof faris la finaĵon o al ĉiuj substantivoj, a al ĉiuj adjektivoj k.t.p. li faris ekstreman ĝeneraligon per tio malŝarĝante la memoron.

Transskribante nacilingvan formon en esperantan grafion oni konsideras la prononcan kaj grafian internaciecon de la koncerna vorto laŭ la modelo, kiun faris Zamenhof en sia Fundamento. Ĝuste tio, kion oni ordinare nomas la "spirito de la lingvo" estas la laŭreguleco, la interna analogo kaj konformo en la lingvo. Oni faris gravajn sistemajn studojn pri la transskribado de la literoj, silaboj kaj finaĵoj el la nacilingvaj vortoj. (Rollet de l'Isle pĝ. 41-51 kaj Wüster pĝ. (42).), al kiuj ni almontras. Ni nur klarigas la principon per kelkaj ekzemploj:

Por la internacia finaĵo -tion oni ĉiam preferas doni la esperantan formon -cio. Oni ne esperantigas jen *Ration* per *racio*, jen *Nation* per *naciono* aŭ *nationo*.

En vortlisto starigita en Internacia Scienca Revuo (Nro 3, 1904) oni proponas la vorton *probabilito* (fr. *probabilité*). En sekvintaj numeroj multaj legantoj kontraŭproponas la pli

simplan formon *probabla* (nun oficiala) kun la motivigo, ke ĝi estas analoga kun *kapabla*. (Ja ankaŭ pro adjektiva naturo de la radiko).

P. Stojan (1925) plendas pri la formo *komisaro* oficialigita en la unua Oficiala Aldono, montrante, ke post zamenhofaj *sekretario*, *notario* oni atendus la analogan formon *komisario*.

5. Principo de bonsoneco (*parola klaro*)

La esperantigita vorto devas esti ne nur belsona — tio estas demando pri gusto — sed ĝi devas esti facile kaj klare elparolebla kaj per tio klare komprenebla. Ankaŭ en sonkombinado oni devas obei la principon de internacieco: eviti tiujn sonojn, kiuj por la plimulto estas malfacile prononcataj. Oni ekz. devas eviti en novaj vortoj ĥ kaj malfacilajn sonkombinaĵojn kiel sc, kc, nkc, ksc, k.t.p. Ĝenerale du sinsekvaj konsonantoj estas malfacile elparoleblaj, kiam unu el ili estas "kunmetita" konsonanto (c, ĉ, ĝ, ĵ, ŝ), ekz. la oficiala *budĝeto* estas malfacila, pli bona estus *buĝeto*.

ANALIZADO DE FREMDVORTOJ LAŬ LA STARIGITAJ PRINCIPOJ

Rilato inter la scienc-teknika kaj komuna lingvoj

Oni nepre devas akre distingi inter la bezonoj de la scienca-teknika lingvo kaj tiuj de la ĝenerala. En la **komuna lingvo** — en tiu esperanto, kiun la esperantistoj deziras instrui al la granda popolamaso — al la miloj da infanoj lernejoj — oni nepre devas gardi ĝian simplan formon — ne aldoni tro da afiksoj, kiuj ne samgrade simpligas la lernadon de la lingvo — ne pligrandigi la vortaron sen nepra bezono, t. e. ke la principo de vortara ekonomio ĉi tie antaŭ ĉio devas esti konsiderata. En la **scienc-teknika lingvo** la postulo de precizo estas tre grava. Por la sciencisto **internacia** vorto jam konata prezentas pli klaran kaj precizan esprimon ol nekonata kunmetaĵo el konataj esperantaj radikoj:

”... kunmetata vorto komprenebla sen speciala interkonsento aŭ per internacia konsento, havas pli grandan valoron ol netute internacia simpla vorto. Sed ĝi ne egalvaloras tute internacian simplan vorton, ĉar oni devas atenti, ke por sciencistoj aŭ teknikistoj, vorto, kiun ili konas, ĉiam prezentos pli grandan certecon de preciza komprenebleco ol alia nova vorto, eĉ perfekte komprenebla; efektive tiu lasta bezonas iom da interkonsento por esti sendube aplikata al esprimota ideo. (Ekz. ili ŝatos pli *antropoida* ol *homforma*; *poliedro* ol *multedro*; *multipliki* ol *obligi*; *isomorfa* ol *samforma* k.t.p.) Plie trovi en la

lingvo vortojn, kiujn ili kutimas uzi, certe allogas sciencistojn aŭ teknikistojn ...” (Rollet de l’Isle) (komparu sub principo de vortara ekonomio punkto ĉ).

Oni do vidas, ke la principo de internacieco estas pli grava en la scienca-teknika lingvo ol en la ĝenerala. La unua estas multe pli dependa de la formoj jam ekzistantaj en la naciaj lingvoj, kiujn kutimas uzi la sciencistoj kaj teknikistoj — dum la ĝenerala lingvo prefere pliboniĝas kreskante per siaj propraj elementoj, evoluante per sia propra forto. La esperantisto-sciencisto ofte bezonas sin esprimi per neologismoj, kiuj en la komuna lingvo estus nepre nepermesindaj.

Ĝeneralaj ekzemploj de analizado

Kiam oni havas la taskon elekti la plej bonan vortformon por esprimota ideo, oni do konsideras la supre menciitajn kvin principojn. Tre ofte ne estas eble trovi esprimon, kiu konformas al ĉiuj principoj — montriĝas je komparo inter proponebaj formoj, ke ili povas kontraŭi unuj al la aliaj. Ni ilustras tion per ekzemploj:

Ni deziras esprimi en esperanto internacian vorton ”*Funktionalisme*”. Proponeblaj formoj: *funkcionalismo*, *funkciismo*.

[3]* *Funkcionalismo* estas la plej internacia formo — senpe-
re komprenata de la plimulto: ĝi estas konforma al la principo
de internacieco. *Funkciismo* konformas al la principo de kon-
cizo kaj — ĉar kunmetita el oficialaj vortradikoj — al la prin-
cipo de vortara ekonomio. Tamen oni vidas tre ofte la unu-

* La enparentezigitaj ciferoj markas la ekzemplojn montrante al grafikaĵo sur pĝ. 52.

an formon kaj similajn formojn, ekz. *racionalismo* anstataŭ *raciismo*, *naturalismo* anstataŭ *naturismo*, *pacifismo* anstataŭ *pacismo* k.t.p., ĉar ili estas pli internaciaj — pli multe laŭ la kutimo, sed espereble tiaj pezaj formoj malaperos.

Ni deziras esperantigi la internacian esprimon *sexual education* (angla). Proponeblaj formoj: *seksuala edukacio*, *seksa eduko*.

[4] Ni tuj povas forĵeti *edukacio*, ĉar ĝi estas kontraŭ la principo de vortara ekonomio — la oficiala vorto *eduko* estas nepre preferinda. Inter *seksa* kaj *seksuala* oni povas heziti. Kiel adjektivo *seksuala* estas la kutima internacia formo, sed ĉar ankaŭ *seksa* estas bone konata per la substantivo *sex* en diversaj lingvoj, tial tiu formo montriĝis plene sufiĉa.

[5] K. Bein enkondukis la vorton *prestidigitatoro* (laŭ PV). Pro peko kontraŭ la principo de koncizo kaj la principo de bonsoneco ŝajnas, ke oni ne maltrafus, anstataŭigante ĝin per simpla *iluziisto*, kiu almenaŭ estas konforma al la principo de vortara ekonomio, kvankam nekonforma al la principo de internacieco.

La vorto *ekshibitionismo* uzita de S. Ziegler (en "Sekspsiologio", SAT-Biblioteko, 1926) ne estas konforma al principo de laŭreguleco, kiu postulas la formon *ekshibiciismo*.

[6] La internacian formon *proletario* (oficiala) anstataŭigis la pli konciza formo *proleto*, per kiu oni kunmetas *proletaro* anstataŭ *proletariato*. La neoficialaj formoj estas la plej ĝenerale uzataj.

[6] Same la oficiala *spontanea* ofte estas anstataŭigata per pli koncizaj *spontana* aŭ *sponta*.

Kontraŭe oni ofte preferas formojn *iniciativo* kaj *iniciatoro* anstataŭ koncizajn, oficialajn *iniciato* kaj *iniciatanto*. Same

anstataŭ oficialan *skadro* la zamenhofan *eskadron*^o aŭ la formon *skadrono*.

Specialan konformiĝon al la principo de koncizo reprezentas kiel moderna lingva fenomeno la t.n. **stumpvortoj** (germane Stutzwörter, angle stumpwords), por kiuj ni en naciaj lingvoj povas trovi multajn ekzemplojn. Stumpvorto kreiĝas tiel, ke el longa vorto oni forĵetas la plejparton restigante nur malgrandan parton, stumpon, kiu ofte havis nenium memstaran signifon. Francaj vortoj kiel *amphi* (el amphithéâtre), *métro* (el métropolitain), *taxi* (el taximètre) estas tiaj modernaj stumpvortoj. El *automobil* oni en franca lingvo kreis *auto*, en dana lingvo *bil*.

La francida esperanta vorto *aŭtobuso* estas **kunmetita stumpvorto** (kontaminacio) kreita laŭ jena proceso: *auto(mobil) + (omni)bus = autobus*. En tiu rilato estas interesa la dana *omnibil* kunmetita el elementoj el la samaj du vortoj laŭ analogo proceso: *omni(bus) + (automo)bil = omnibil*. Tiu vorto havas la saman signifon kiel la esperanta *aŭtobuso*.

Oni precipe post la milito artefaris amason da tiaj kontaminacioj, per kiuj oni precipe en revoluciaj rondoj raciigas la lingvon: *Komintern* (Kommunistische Internationale), *Agitprop* (Agitation & Propaganda), *Inprekor* (Internationaler Presse Korrespondent), *Kolhoz* (rusa: kollektivnoje hosjajstvo, kolektiva mastrumo) k.t.p. k.t.p.

En esperanto oni certe devas prudente sekvi tiun emon al mallongaj esprimoj ne farante al si tro da proetimologiaj skrupuloj. Sed oni ja devas atenti, ke oni ne pro koncizo peku kontraŭ la principo de internacieco. Ekz. por *aristokrato* oni ne senkritike devas esperantigi la francan stumpvorton *aristo* (pariza ĵargono), kiu per la konciziĝo perdis sian interna-

cian karakteron. En esperanto oni jam ofte uzas *kino* anstataŭ *kinematografo*, *foto* anstataŭ *fotografajo*. — Same okazas aliaj koncizigaj lingvaj procezoj: *stenodaktilografi* > *stenodaktili*, ankoraŭ pli bona estus *stenodakti*, *radiofotografio* > *radiografio*, pli bona eble estus *radiofoto*, *radiotelefonio* > *radiofonio*, *radiotelegramo* > *radiogramo* k. s.

Anstataŭ *aŭtomobilo*, *taksimetra aŭtomobilo* kaj *amfiteatro* oni sendomaĝe povus akcepti *aŭto**, *taksio* kaj *amfio* k.t.p.

Similaj al kontaminacioj kaj same ludantaj lingvekonomian rolon estas vortoj kun duobla provizo da samsonaj silaboj (aŭ sonoj aŭ songrupoj), kio kaŭzas elĵeton de unu el ili, ekz. *tragikokomedio* jam en nacilingva uzo fariĝis *tragikomedio*, kaj *mineralogio* devus tute korekte nomiĝi *mineralologio*. Tian forigon de superflua sonduoblaĵo oni nomas per speciala termino **haplologio**. Tiu simpliga tendenco certe ankaŭ estas kelkfoje konscie aplikebla por esperantigo. Tiel oni apenaŭ riskus domaĝon anstataŭigante *hipopotamo* per *hipotamo* k. s.

Cetere atentindaj el lingvekonomia vidpunkto ankaŭ estas la **litervortoj**, ekz. U.S.A., U.S.S.R., S.A.T., U.E.A., T.E.K.A., L.E.A., P.K., K.R., L.K., k.t.p. per kiuj oni nomigas landojn, firmojn, instituciojn, unuiĝojn k.t.p. kaj el kiuj multaj taŭgas por fari novajn. ankoraŭ pli koncizajn vortojn: *Sat*, *Koro*, *Teka*, *Hapag* (H. A. P. A. G. = Hamburg-Amerikanische-Parkettfahrt-Aktien-Gesellschaft) k.t.p.

[7] En Internacia Scienca Revuo (1904 kaj sekvintajn jarojn) oni proponis *funcio*, *acidento*, *vacini* k.a. pro pli facila prononco. La formoj *funkcio*, *akcidento*, *vakcini* oficialiĝis: la

* uzita de Baghy: Ŝi banas sin en porcelana kuvo, per aŭto ŝi veturas dum la pluvo. (Pilgrimo, pĝ. 83.)

atento pri la principo de internacieco venkis super tiu pri la principo de bonsoneco.

Cetere oni emas konforme al tiu lasta principo forigi el la vortoj la malfacile elparoleblan ĥ. Verax proponas kiom eble plej grandan uzadon de k anstataŭ ĥ: *kemio* (*ĥemio*), *koruso* (*ĥoro*) k.t.p. La evoluo anstataŭigis *arĥitekto*, *teĥniko*, *psiĥologio*, *ĥino* kaj multajn aliajn formojn uzatajn antaŭ 20 jaroj per simplaj *arkitekto*, *tekniko*, *psikologio*, *ĉino* k.t.p.

Interesaj el kritike analiza vidpunkto estas tiuj vortoj, pri kiuj oni hezitas uzante du formojn el diversaj lingvofontoj havantaj la saman sencon. Ili bone ilustras la malfacilojn en la elekto de la plej taŭga formo por nova vorto. Jen kelkaj ekzemploj: oni uzas *tempesto* apud *ŝtormo*, *kaki* apud *feki*, *prelego* apud *lekcio*, *aceto* apud *vinagro*, *skorio* apud *ŝlako*, *trabanto* apud *satelito*, *strando* apud *plaĝo*, *apologo* apud *fablo*, *diareo* apud *lakso*, *skuno** apud *goleto*.

Pro kio do aperas tiaj duope paralele uzataj formoj? Sendube oni grandaparte devas serĉi la kaŭzon en la influo de la naciaj lingvoj. Tute nature la anglo preferas la formon *tempesto* samtempe ke la germano pli ŝatas la formon *ŝtormo*, kiu al li estas plej simpla. Dum germana esperantisto uzas la vorton *strando*, franco pli emas al la formo *plaĝo*, k.t.p. — diversaj aŭtoroj — diversaj gustoj. Ke eĉ sama aŭtoro povas havi diversajn gustojn: *skuno* kaj *goleto* estas ambaŭ zamenhofaj — tio nur estas stranga, aparta kazo. Ofte la lukto okazas inter internacia grekolatinida vorto kaj vorto internacie konata sed ĉerpita el nacia lingvo, ekz. *apologo* kaj *fablo*, aŭ ĝi estas kaŭzita de lingva kritiko ĉe la uzantoj ekz. pro nesufiĉa internacieco de iu esprimo, tiel *diareo* anstataŭas la formon *lakso*

* En la vortaro de Verax troviĝas formo *ŝunero* nun ne plu uzata.

malgraŭ ties koncizo ĝuste pro la pli internacia karaktero de *diareo*. Same anstataŭ oficiala *lekcio* oni tre ofte uzas *prelego* — bona anstataŭigo, unue ĉar ĝi estas pli bonsona, due ĉar verŝajne la radiko memorigante pri la radiko "legi" kaŭzas ideasocion al la germana vorto *Vorlesung*. Alia afero estas la senduba danĝero de laŭplaĉa anstataŭigo de malnovaj radikoj per novaj.

Tiaj paralele uzataj vortoj ankaŭ ekzistas en la kulturlingvoj. En esperanto verŝajne kelkaj el la superfluaĵ vortoj estos tute elŝovitaj ekz. kiel menciite rimarkinde maloftiĝis *lekcio*, dum *prelego* fariĝis pli ĝenerala vorto. En aliaj el tiuj vortparoj probable iom post iom kreiĝos ia nuanco, ekz. tiel ke *plaĝo* povus prezenti la ideon de "strando, kiu estas oportuna por banado", aŭ simple "banloko", k. s.

RIMARKO: Kelkfoje pluraj proponoj povas esti pravigataj — oni ekz. povas heziti, el kiu nacilingva formo oni devenigu la internacian vorton. Tiel oni povas apliki diversajn formojn dum multaj jaroj ĝis fine la ĝenerala uzado de unu formo povas decidi ĝian oficialigon. Ekzemplo pri tio povas esti la vorto *konkeri*. En la Dana-Esperanta vortaro de Bendix (1909) oni proponis la formon *konkvesti*. En la vortaro de Verax (1910) oni trovas la formon *konkveri*, kiu jam estis ofte uzata ekz. en Internacia Scienca Revuo (1904 kaj sekvintajn jarojn). en la vortaro de Kabe oni trovas ĝis la lasta eldono (1925) *konkiri*, kaj fine en PV (1930) la nun ĝenerale uzatan oficialan formon *konkeri*.

Antaŭ 20 jaroj oni ordinaro uzis la formon *pronunci*, poste *prononci* venkis kaj fariĝis oficiala. Same oni hezitis inter *vipero* kaj *vipuro*, la lasta formo venkis, kaj hodiaŭ oni hezitas

inter *pingvino* kaj *pingveno*, *batato* kaj *patato*, *baledo* kaj *baleto*, *ŝofero* kaj *ŝoforo*, k.a. La popolo decidas.

Specialaj ekzemploj

Estas eble starigi kelkajn grupojn el tipaj fremdvortoj karakterizaj per siaj finaĵoj. Ĉar ili ampleksas sufiĉe konsiderindan parton de la fremdvortoj, ni speciale pritraktas kelkajn tiajn grupojn, aplikante niajn kvin principojn por kritika analizado de kelkaj ekzemploj.

Vortoj kun finaĵo -cio

Diskutojn kaŭzis la vortoj, kiuj finiĝas per *-cio* respondanta al la internacia finaĵo *-tion*: ĉu *redakcio*, *administracio* aŭ *redaktejo*, *administrejo*? Hodiaŭ ĉiuj konsentas, ke ambaŭ formoj estas kune uzablaj: *redaktejo*, *administrejo* estas ejo, kie oni redaktas, administras, kie oficas la *redakcio*, *administracio*, kaj tiuj lastaj du vortoj signifas respektive redaktistaro, administrantaro. Tamen oni kutimas uzi ilin ankaŭ en la senco de *redaktejo*, *administrejo*.

[8] En aliaj vortoj *-cio* estas forigebla. Verax ekz. diras *koaguli* kaj ne *koagulacii* — li eĉ proponas *koagli*. *Koagulacii* pekus kontraŭ la principo de vorta ekonomio kaj de bonsoneco. Aliflanke *koagli* estas bonsona kaj konciza, sed tamen dube bona, ĉar la formo *koaguli* estas pli konforma al la principo de internacieco.

[9] Same estas uzata anstataŭ la malbonsona kaj malkonciza *opozicii* (oficiala) la neoficiala vorto *oponi*, sed oni ne uzas konsekvence la formon *opono* (kontraŭ la principo de laŭre-

guleco), ĉar *opozicio* estas pli senpere internacie komprenata.

[10] Oni diras *diskuti*, sed jen oni uzas konsekvencon formon *diskuto* kaj ne la malpli bonsonan kaj koncizan, sed pli internacian formon *diskucio*.

En la oficiala vorto *kapitulaci* oni forĵetis nur *i* el *kapitulacii*. Pli bona estus simpla formo *kapituli* kun substantiva *kapitul(ad)o* (*ado* jen respondas al la germana *ierung* kaj angla *ing*, finaĵoj ofte uzataj por internaciaj vortoj).

Same anstataŭ *irigacio* oni proponis la formon *irigaco*, kiu en la jena okazo estas pravigebla, ĉar oni ne bone povas uzi la formon *irigi* pro ebla konfuzo kun la signifo "igi iri".

En la vortaro de Verax troviĝas la formoj *kristaligo* kaj *neŭtriga* kaj ne la pezaj *kristalizacio* kaj *neŭtralizacia*.

Se oni analizas la **oficialan radikaron** de esperanto oni miras pro la nekonsekvenco en la oficialaj verbaj formoj de kelkaj internaciaj vortoj kun finaĵo *-cio* (nekonformo al la principo de laŭreguleco):

abnegacio, abnegacii

apelacio, apelacii

civilizacio, civilizacii

deklinacio, deklinacii

dekoracio, dekoracii

demonstracio, demonstracii

erupcio, erupcii

konjugacio, konjugacii

konversacio, konversacii

navigacio, navigacii

reformacio, reformacii

spekulacio, spekulacii

sed nekonsekvence:

administracio, administri

delegacio, delegi

kontribucio, kontribui

rezignacio, rezigni k.t.p.

Oni sin demandas, kial oni oficiale rajtas diri *delegi*, sed ne *abnegi*, *kontribui*, *rezigni*, sed ne *apeli*, *deklini*.

Kiel rezulto de interkonsiliĝa enketo post korespondado kun L.K.-anoj raportas la fakestro de komuna vortaro Prof. E. Grosjean-Maupin:

”... multaj el miaj kolegoj ... aldonas tre atentindajn rimarkojn kaj ĝustajn kritikojn koncerne la vortojn kun la pseŭdosufiksoj *acio*, *icio*, *ucio* kaj la verban finiĝon *ii*. Pro klare montritaj motivoj ili principe firme malaprobas la radikojn *apelaci’*, *arbitraci’*, *civilizaci’*, *deklaraci’*, *erudici’*, *evoluci’*, *kontribuci’*, *konversaci’*, *navigaci’*, *revelaci’*, *revizi’*, *rezignaci’*, *spekulaci’*, *sugesti’* k.t.p. preferante la pli simplajn formojn *apel’* aŭ *apelac’*, *arbitrac’*, *civiliz’*, *deklar’*, *erudit’*, *evolu’*, *kontribu’*, *konvers’*, *navig’*, *revel’*, *rezignac’*, *spekul’*, *sugest’*, k. t. p”

A. Oni povas grupigi la **verbonaturajn** -cio-vortojn en du kategoriojn:

1-a: Estas signifa diferenco inter:

administracio, administro

ekspozicio, ekspozo

kontribucio, kontribuo

okupacio, okupo

operacio, opero

projekcio, projekto k.t.p.

2-a: sed:

deklaro = *deklaracio*

evoluo = *evolucio*

inaŭguro = *inaŭguracio* k.t.p

En la **1-a kategorio** oni povas ellasi *i* kiel oni faris en *kapitulaco**, *obstrukco* k.a. kaj proponis en *arbitrac'*, *reziĝnac'* k.t.p. por eviti la malbonsonajn vortojn kun — *cii*. La ellaso de *i* konformas en la plej multaj okazoj al la principoj de koncizo kaj bonsoneco, sed apenaŭ al la principo de internacieco. Se oni volas apliki tiun ellason, tiam oni devas esti konsekvenca ĉiam ellasante *i* el -cio-vortoj de tiu kategorio. Eble tiuj formoj iam montriĝos vivkapablaj pro koncizo, sed ankoraŭ la kutimo el la naciaj lingvoj pri -cio supozinde estas tro forta. (En angla lingvo oni tamen povas trovi iom analogajn formojn en verboj *irigate*(*irigaci*), *operate*(*operaci*) k.t.p.).

En la **2-a kategorio** oni povas eviti la finaĵojn *cio*, *acio*, *icio*, *ucio*, substantivigante la purajn verbojn: *deklari-deklaro*. En la vortoj de tiu kategorio la substantivoj konservis sian etimologian signifon: ago aŭ rezulto de ago, kiun signifon donas en la latina lingvo la finaĵo *-io*, *-ionis*, aldonata al la supina formo de la verbo (Ekz. *agere*, *actum* per kiu *actionis* fariĝis internacia, retrovebla en esperanta *transakcio*).

B. Pri la -cio-vortoj kun **substantiva naturo** ni povas fari la sekvantajn konsiderojn:

a) En kelkaj -cio-vortoj la substantiva formo estas la ĉefa;

* Vidu pri *kapitulaco* pĝ. 34. Tiu ĉi vorto do apartenas al nia 2-a kategorio, kvankam ĝi estas menciata kiel ekzemplo por la praktikado de la 1-a.

el tiu oni devenigas la verban formon. Ekz. *ambicio-ambicii, sankcio-sankcii, subvencio-subvencii*, en kiuj ekzistas neniu simpla internacia verba formo. En tiaj vortoj *i* povus esti ellasata aŭ ne.

b) En aliaj substantivaj -cio-vortoj ekzistas nur substantiva formo (kelkaj kun adjektiva derivato). Ekz. *generacio, nacio, obligacio, pozicio, racio, restoracio*, k.t.p. En ili oni certe devus konservi *i*.

c) Vortoj kiel *akacio, akcio, glacio, gracia, kalcio*, k.t.p. estas etimologie neparencaj kun la aliaj cio-vortoj — ili devas resti neŝanĝitaj.

Vortoj kun finaĵo -enc' aŭ -ent'.

En la **oficiala radikaro** ni trovas kelkajn neanalogajn formojn kun tiuj finaĵoj: *konsekvenco, potenco, sed elokventa, evidenta, kompetenta, impertinenta, indiferenta, inteligenta* k.t.p.

Laŭ la oficiala difino de tiuj vortoj ili ĉiuj reprezentas kvaliton t.e. ili posedas adjektivan naturon. Laŭ la principo de laŭreguleco estus konvene estonte eviti devenigon en esperanton de substantive devenigitaj adjektivradikaj fontvortoj kiel *konsekvenca* k.t.p. (Tamen *ekscelenco, eminenco*, ĉar ili estas substantivradikaj kiel titoloj).

[11] Vortoj kiel *kondolenci* (vidu pĝ. 13), *riverenci, diferenci, dekadenco* estas devenigitaj de substantivaj formoj de verbradikaj vortoj. Kiel fundamentajn formojn estus pli logike elekti la mallongajn *kondoli, riveri* (franca *révéler*), *diferi* (franca *différer*), *dekadi* (hispana *decaer*). La oficialaj formoj tamen hodiaŭ estas absolute preferindaj pro sia internacieco, (kaj *riverenci* eble ankaŭ pro ekzisto de *rivero* en signifo de fluanta akvaro).

La duformeco de tiaj ĉi vortoj donas al ni la eblon fari nu-ancojn, ekz.: *konkurenci* (komerce *konkuri*), *konfidenci* (*konfi-di* en la signifo "forlasi al la diskreteco de iu ion, kion li de-vas silenti". Laŭ PV).

Vortoj kun finaĵo **-io** aŭ **-iko**.

En la **oficiala radikaro** oni trovas la formojn:

anatomio, anatomiisto
biologio, biologiisto
entomologio, entomologiisto
etimologio, etimologiisto
etnografio, etnografiisto
fiziologio, fiziologiisto
genealogio, genealogiisto
grafologio, grafologiisto
ideografio, ideografiisto
kartografio, kartografiisto
meteorologio, meteorologiisto
mineralogio, mineralogiisto
ornitologio, ornitologiisto
paleografio, paleografiisto
paleontologio, paleontologiisto
patologio, patologiisto
tipografio, tipografiisto

sed nekonsekvence:

geologio, geologo
filologio, filologo
astronomio, astronomo

[12] Forigante la formojn finiĝantajn per *iisto* ni havas pli koncizan kaj pli bonsonan *ornitologo* k.t.p. La enkonduko de neologismoj kiel *ornitologo* estas konforma al la principo de internacieco kaj tiu de laŭreguleco kaj oni en tiu ĉi okazo certe povas sendomaĝe toleri la pekon kontraŭ la principo de vortara ekonomio.

Oni proponis formojn kiel *filozofo* en senco de *filozofio* (*filozofado*) rigardante ĝin kiel substantivan formon de *filozofi*, sekve oni povus tiam regule formi *filozofisto*.

Kontraŭe oni volis anstataŭigi *nekrologo* per *nekrologio**, per kio oni povus rezervi al la finaĵo *ologo* la signifon de persono.

[13] Tiuj du ekzemploj povas ilustrati, kiel oni provis kontraŭbatali la arbitron de la malnovaj lingvoj celante konformigi la novan lingvon al la principo de laŭreguleco metante en duan vicon la principon de internacieco. La esperantistoj tamen nun certe finspertis, ke estas praktike neeble kateni lingvon per rigidaj reguloj, kiuj spitas la kutimon. Oni ja ne devas forgesi, ke ĝuste tiu kutimo estas lingvosimpliga faktoro tre konsiderinda.

Dum la lastaj jaroj disvastiĝis la uzado de la internacia finaĵo — io por landaj nomoj — precipe en laboristaj rondoj oni uzas ĝin konsekvence kiel sufikson anstataŭ la malpli internacian (por la poŝto!), oficialan radikon -ujo. La demando pri la nomigado de landoj kaŭzis multe da ofte akraj diskutoj, pri kies rezulto decidis la estonto.

Koncerne al la landnoma problemo meritas ripeton tiu propono, kiun faris P. Christaller jam en 1914 pri apostrofa-

* Tiun formon mi lastfoje vidis en »Argentina Esperantisto« Julio-Aŭg. 1932. Verŝajne ĝi aperis en esperanto ĉefe pro influo de la franca vorto *necrologie*.

do de landaj nomoj: *Germanujo* > *German'jo*, *Belgujo* > *Belg'jo*, per kio oni forigante u havus akcenton laŭ la naciaj kutimoj (konformigante al la principo de internacieco), kaj per kio oni samtempe en multaj landnomoj povus eviti la akcentadon de i, kiu por multaj estas malagraba.

Analoga kun *iisto* ni trovas la finaĵon *ikisto* en kelkaj oficialaj vortoj, pri kiuj plendas P. Stojan (1925):”*gimnastikisto, beletristikisto, meĥanikisto, botanikisto, numismatikisto, ...* anstataŭ raciaj *gimnasto, beletristo, meĥanisto, botanisto, numismatisto* (fakoj). Ja ni havas jam parojn simetriaajn — *simbolo simboliko, lingvisto lingvistiko, retoro retoriko, poeto poetiko, skolasto skolastiko, stilisto stilistiko, k.a.*”.

En multaj kazoj ni povas fari eĉ pli simplajn formojn ol la supre menciitajn: *beletr(istik)isto* > *beletro*, *estet(ik)isto* > *esteto*, *gramat(ik)isto* > *gramato*, *matemat(ik)isto* > *matemato*, *numismat(ik)isto* > *numismato* respondajn al oficialaj *retoro, akrobato*, kaj proponitaj *gimnasto, skolasto*.

Oni proponis anstataŭigi *matematika* per *matemata*, *botanika* per *botana*. k.t.p. kaj oni sekve por la respondaj istoj devus havi *matematisto, botanisto*. Same ni trovas en PV *beletro* kiel novan formon por *beletristiko*. Sed evidente estas pli racie prefere al tiuj formoj akcepti *matemato* — *matematiko, botano** — *botaniko, beletro* — *beletriko*, respondajn al *akrobato* — *akrobatiko, diplomato* — *diplomatiko, filologo* — *filologio, astronomo* — *astronomio*. Estas ja pli konsekvenca uzi *beletro* anstataŭ *beletristo* aŭ *beletrikisto* aŭ *beletristikisto*.

* la grekaj radikoj *botan'* = planto. *matematos'* = scienco ne estas memstare uzataj en la modernaj lingvoj kaj ili tial estas bone aplikeblaj por la esperantistoj. Entute pure etimologiaj motivoj ne devas sufiĉi por bari vojon al pli raciaj vortformoj.

Oni multfoje ankaŭ faris la proponon akcepti la finaĵojn -i' kaj -ik' kiel sufiksojn por fako, klaso, arto, scienco. La konsekvenca uzado de tiuj sufiksoj donus la eblon krei multe da novaj esprimoj, kaj krom tio oni povus anstataŭigi plurajn nun uzatajn -ik- kaj -i-formojn per pli raciaj.

Konsiderante -ik' kaj -i' kiel esperantajn sufiksojn ni povas distingi du kategoriojn:

- 1) La baza vortradiko esprimas personon:
 - a) ik': *gimnasto, matemato, botano, oratoro.*
 - b) i': *alĥemo, terapo (kuracisto), stratego, diplomato, monarko, kirurgo, filozofo, stenografo, astronomo, filologo.*
- 2) La baza vortradiko esprimas temon aŭ objekton por la fako esprimata per:
 - a) ik': *lingvo, ĵurnalo* per kiuj oni havus *lingviko* kaj *lingvisto, ĵurnaliko* kaj *ĵurnalisto*. (Pri vortoj kiel *fiziko, meĥaniko, optiko, tekniko* oni povas dubi ĉu apartenigi ilin al tiu ĉi kategorio, kio pravigus la simplajn *fizisto, meĥanisto, optisto, teknisto*, aŭ ĉu severe konsideri ilin kiel nerompeblajn radikojn).
 - b) i': *telegrafo — telegrafio — telegrafisto, telefono — telefonio — telefonisto, mikroskopo — mikroskopio — mikroskopisto.*

Kvankam formoj kiel *lingviko, ĵurnaliko*, anstataŭ *lingvistiko, ĵurnalistiko* estus preferindaj, la tempo por konsekvenca uzado de tiaj pli raciaj formoj per sufiksigo de ik' kaj i' tamen ankoraŭ eble ne estas sufiĉe matura (vidu la konkludon sub 2). Oni per tio kreus multe da puraj, eble idealaj esperantoformoj, kiuj tamen en multaj kazoj estus maltro internaciaj

laŭ vidpunkto hodiaŭa. (Ekz. *danciko*: la arto danci aŭ krei dancojn, *desegniko*: la arto desegni, *ĝardeniko* apud *ĝardenarto*, *arkitektiko* aŭ *arkitektio* apud *arkitekturo*, *edukiko* aŭ *edukio* apud *pedagogio*, *mastrumiko* aŭ *mastrumio*: prihejma ekonomiko aŭ ekonomio, k.t.p., k.t.p.).

En francidaj vortoj — *ik* (ique) ofte estas adjektiva finaĵo, kiu egalas al esperanta — *a*, kaj tial ofte estas sendomaĝe forigebla, ekz. *erota*, *aŭtenta*, *hermeta*, kiel jam en *elasta* k.t.p. anstataŭ *erotika*, *aŭtentika*, *hermetika*, *elastika* k.t.p. (principo de koncizo).

Botanika kaj zoologia nomigado

Aparta, sed pro alporto de multaj neologismoj tre grava problemo estas racia nomigado en esperanto de plantoj kaj bestoj. Tiu problemo unuavice koncernas al la *ĝenerala lingvo* — duavice al la scienca lingvo, en kiu sufiĉas simple uzi la latin-grekajn nomojn.

Ofte okazas, ke oni hezitas en la elekto de konvena esperanta formo pri planta aŭ besta nomo. Ekz. la saman planton oni nomas *medikago* kaj *luzerno*, la saman beston *makrocefalo* kaj *kaĉaloto*. Utilas do rigardi kaj kritiki la diversajn manierojn, en kiuj oni en esperanto kreas tiajn nomojn. Ni tion faras tre nedetale.

Oni povas sekvi kvar procedojn:

- 1) Oni esperantigas la gentan nomon de la scienca nomo*, ekz. *medikago* (*medicago sativa*), *eriko* (specoj de *erica*), *perko* (*perca fluviatilis*).

* La sciencaj nomoj konsistas el du partoj, el kiuj indikas la unua genton, la dua specon,

- 2) Oni esperantigas la spec-karakterizan nomon de la scienca nomo, ekz. *makrocefalo* (*physeter macrocephalus*), *frugilego* (*corvus frugilegus*), *cembro* (*pinus cembra*), *aŭrikulo* (*primula auricula*).
- 3) Oni esperantigas senpere nacilingvan nomon internacie konatan ekz. *kaĉaloto* (*physeter macrocephalus*), *luzerno* (*medicago sativa*), *edelvejso* (specoj de *leontopodium*), *ĉevalo* (*equus caballus*), *marabuo* (*leptoptilus*).
- 4) Oni tradukas esperanten la sencon de nacilingva nomo. Zamenhofaj ekzemploj el fabeloj de Andersen: *krestoflora* (*celosia cristata*) *fajrolilio* (verŝajne *lilium croceum*), *neĝborulo* (*galanthus nivalis*), *akva rozo* (*nymphaea alba*), *majskarabo* (specoj de *melolontha*).

Koncerne al 1). Tiu procedo estas bona por esperantigi nomon de gento, ekz. *lilio* (*lilium*) kaj nomon de speco apartenanta al gento, en kiu ekzistas neniu alia speco, ekz. *egopodio* (ekzistas nur *ægopodium podagraria*), alie ĝi estas dube bona por esperantigi nomon de speco. Ekz. *medikago* por la speco *medicago sativa* estas nekontentiga, ĉar ekzistas krom *m. sativa* alia ĝenerale konata speco el tiu gento: *medicago lupulina*. Por la gento oni prave povas akcepti la nomon *medikago*, sed por la speco oni devas trovi alian nomon por ne riski konfuzon: *luzerno* estas internacie tre konata kaj tute kontentiga.

Koncerne al 2). Tiu ĉi multe uzata maniero estas bona, kiam ĝi estas praktikebla. Sed en multaj kazoj la speco nomo en la scienca nomo ne taŭgas por esperantigo. Ekz. *vulgaris*, *sativa*, *major*, *arvensis*, *gracilis* (k.t.p.) ĉiu troviĝas en multaj botanikaj kaj zoologiaj nomoj. La esperanta formo *makrocefalo* tial estas dube bona por *physeter macrocephalus*, ĉar ekzistas pluraj

aliaj specoj karakterizataj per *macrocephalus*: *ampelisca macrocephala*, *tetigometra macrocephala* (bestoj), *centaurea macrocephala*, *senecio macrocephalus*, *inula macrocephala* (plantoj) k.a. Por tiu besto la nomo *kaĉaloto* estas preferinda.

Koncerne al 3). Certe oni devas — se eble preferi nacilingvaj nomojn por specoj, almenaŭ se tiaj nomoj ekzistas en formo internacie sufiĉe konata kiel *kaĉaloto*. Oni memoru, ke al la nesciencista publiko, kiu en la ĝenerala lingvo devas uzi tiajn nomojn, la sciencaj nomoj plej ofte estas tute nekonataj kaj *kaĉaloto* certe estas multe pli konata ol la scienca nomo esperantigita. Pli bone estas esperantigi nacilingvan nomon almenaŭ iom konatan, (komparu pĝ. 10 la ekzemplojn *pueroknabo* kaj *sudor-ŝviti*).

Koncerne al 4). En la nacilingvaj nomoj de plantoj kaj bestoj ekzistas granda fonto, el kiu oni povas ĉerpi, kiam oni havas la taskon krei tian nomon en esperanto. Sed oni devas konfesi, ke la tasko ne ĉiam estas facila. Kiom da ĉarma poezio estas en la nacilingvaj nomoj de *myosotis*, kies nomon *forget-me-not*, *Vergissmeinnicht*, *ne m' oubliez pas*, k.t.p. konas ĝuste pro ĝia poezio ĉiu infaneto en la respektivaj landoj. Sed en esperanto oni ne sukcesis trovi ekvivalenton por ĝi. Mi kredas, ke jen kreado de tiaj nomoj estas tasko inda por niaj verkistoj kaj poetoj — ili uzu sian fantazion kaj kreu nomojn, kiuj en konciza, klara, bela formo instigu la povon imagi per tio donante precizan bildon pri tiu besto aŭ tiu planto, por kiu oni deziras en la menson voki kaj memore reteni ideon. En la nomo *neĝborulo* ("tiu, kiu boras tra neĝo") la aŭtoro trafis belan ideon kaj oni facile memoras la nomon, ĉar ĝi memorigas pri nacilingvaj nomoj. *Galanto* estas ĝenerale uzata en esperanto por tiu floro, ĝi bone taŭgas, ĉar ĝi estas mal-

longa kaj klara, kaj ĉar la nefakulo uzante ĝin ne bezonas diferencigi inter la diversaj ĝardene uzataj specoj de la gento *galanthus*. Sed la enkonduko de tiu radikulo fakte estis evitebla kun profito, ĉar la ĝenerala publiko ne konas la nomon *galanthus*. Kaj same, ĉu ne *milpiedulo* (myriopoda) estus pli facile komprenata ol *miriapodo*. Oni jam uzas similajn nomojn por kelkaj zoologiaj grupoj; ekz. *krustuloj* (klaso *crustacea*), *pikbekuloj* (familio *sylviadæ*), *roduloj* (ordo *rodentia*). — *Majskarabo* (*melolontha*-specoj) memorigas pri angla *maybug*, germana *Maikäfer*; la nomon *melolonto* oni same povas uzi, sed ĝi tre bone povas manki en la komuna lingvo. *Krestofloro* (*celosia cristata*) estas tute bona nomo, ĉar laŭsence ankaŭ sufiĉe internacia. Farante nomojn oni ne faru al si tro da prisciencaj skrupuloj — ne temas pri scienca terminaro, sed pri vortar-ekonomia kreado de psikologie ĝustetrafaĵaj esprimoj facile memoreblaj. Ne gravas por laiko, ke *akva rozo** (*nymphæa alba*) fakte apartenas al alia loko en la botanika sistemo ol *rozo* (*rosa*), same kiel *terpomo* tute ne estas pomo.

En la naciaj lingvoj oni ankaŭ kutimas nomigi per vorto, kiu en figura senco iel karakterizas la nomigitan planton aŭ beston. En tiu maniero kreigis belaj kaj trafaj nomoj, kiuj ofte atestas pri la sprito de la popola fantazio. Estus vere domaĝo, se ĉerpado el tiu abunda trezoro estus malpermesata al la uzantoj de nia lingvo. En la diversaj idiomoj figursenca uzado de vortoj por tia nomigado ne kaŭzis miskomprenon, ĉu do tion ĝi bezonas fari en esperanto? Ke oni en tiu lingvo hezitis apliki metaforojn por tiu celo, tion oni certe ne devas bedaŭri, ĉar tia aplikado postulas singardemon kaj maturon kiel de la uzantoj tiel de la lingvo mem. Nu, oni pretendas, ke

* oni pli ofte uzas en esperanto *akvolilio* por tiu floro.

esperanto fariĝis vivanta lingvo de vivanta popolo, sed ĉiama nura esperantigo de la latingrekaj nomoj ne parolas pri ies fantazio. Kontraŭe ĝi alportas kreskantan ŝarĝon al la vortradikaro de la ĝenerala lingvo (peko kontraŭ la principo de vortara ekonomio). Por *gagea (lutea* k.a. specoj) sufiĉus en la komuna lingvo la nomo orostelo (germane *Goldstern*, dane *Guldstjerne*), por *elodea canadensis* (angle *waterweed*, germane *Wasserpest*, dane *Vandpest*) estus bona *akvopesto*, kaj neornitologia simplulo certe pli facile memorus la nomon *birdoreĝo* (germane *Zaunkönig*, dane *Fuglekonge*) ol la latinidan *regolo* (*regulus cristatus*).


Ĝis nun oni tro ofte nur simple esperantigis la sciencajn nomojn — ne nur en la kazoj, kiam tiuj estas ĝenerale konataj: *gladiolo* (*gladiolus*), *lilio* (*lilium*), *delfeno* (*delphinus*) — sed ankaŭ, kiam la ĝenerala publiko nekonanta la sciencajn nomojn konas nacilingvajn. Niaj verkistoj farus prosperigan servon al nia lingvo donante pli da atento al tiu ĉi flanko de ĝia evoluo.

Grafikaĵo

La ĉi-suba grafikaĵo devas ilustrati la proporcian gravon de la principoj. La supre donitaj ekzemploj, el kiuj ni aludas en la grafikaĵo al kelkaj tipaj, evidentigas, ke plej ofte la principo de internacieco kontraŭstaras la aliajn principojn. Ĝi ofte ludas negativan rolon — oni povas diri, ke ĝi dum la nuna propaganda periodo de esp.-o estas necesa malbono. La encirkligitaj nombroj montras al kelkaj ekzemploj en la teksto signitaj

per respondantaj nombroj enparentezigitaj — [1] kaj [2] montras al la konkludo sur pĝ. 48. La linioj signifas: "kontraŭas al".

La internacieco aludita en la principo de internacieco reprezentas la fontlingvojn, la kutimon, la malnovan sistemon — la aliaj principoj konscie celantaj lingvan klaron kaj ekonomion reprezentas la novan sistemon, la esperantan. La celo de la esperanto-uzantoj estas: krei novan lingvan internaciecon sur la bazo de la malnova. —



KONKLUDO

Oni povas konsideri la proporcian gravon inter la principoj el du vidpunktoj: 1-e laŭ la funkcio de la vorto esperantigota t.e. ĉu la esperantigo koncernas al ideo por la ĝenerala vortaro aŭ por la scienca-teknika vortaro. 2-e laŭ la epoko, en kiu la esperantigo okazas, t.e. ke la proporcia signifo de la principoj unu antaŭ la alia ne estas la sama hodiaŭ kiel post ĝenerala akcepto de esperanto.

1. Laŭ funkcio de la vorto esperantigota

[1] En la **scienca-teknika lingvo** la postulo de precizo kaj la principo de internacieco ludas pli gravan rolon ol en la **popola** lingvo, en kiu la kiom eble plej granda simpla estas gardenda: principoj de vorta kaj vortara ekonomio kaj de laŭ reguleco estas prefere atentataj.

2. Laŭ la epoko de esperantigo

[2] Multaj vortoj estis enkondukataj en la lingvo en sia plena internacia formo — nur kun aldono de gramatika finaĵo — poste la evoluo simpligis la pezajn formojn: *asoziaciono* > *asociacio* > *asocio*, *organizacio* > *organizo*, *internacionalo* > *internacio*, k.t.p. Tiel la evoluo de la lingvo plibonigas ĝian vor-

taron farante la vortojn pli malpezaj, pli koncizaj, sed samtempe por la nescianto de esperanto malpli internaciaj, ĉar eble ne tuj kaj senpere komprenataj. Tiu evoluo okazas samtempe kun la grada plinombriĝo de la esperantistaro — do evoluo tre konvena.

Hodiaŭ, kiam nia lingvo ankoraŭ estas relative malmulte disvastigita, la principo de internacieco certe ludas pli gravan rolon ol la principo de koncizo, sed per pli ĝenerala akcepto kaj uzado de esperanto la evoluo kredeble plifortiĝas favore al la pli koncizaj — nuntempe ankoraŭ ne al kutimigitaj formoj. Dum esperanto nun estas sub forta influo de diversaj lingvoj, precipe latina-greka, angla, franca kaj germana — kaj tio speciale koncernas al la scienca-teknika lingvo — tre verŝajne okazos per ĝenerala uzado de esperanto la malo. Esperanto influos la naciajn lingvojn — oni preferos la koncizajn kaj pli laŭregulajn formojn kreeblajn en tiu lingvo.

La estonton pentras P. Stojan (1922):

”... En la nuna prepara periodo de esperanto., kiam ni devas altiri eŭrop-amerikajn klerulojn, ni toleras milojn da vortoj kaj centojn da radikoj tro konataj por homoj de greko-latina civilizo. Tamen post la definitiva alpreno de L.I. kun la tempo, interna potenco de esperanto aperos en mirinda kreado de novaj vortoj, originalaj, belaj, formitaj el fundamentaj elementoj, kaj tiam la neutilaj grekolatinaĵoj defalos for de esperanto kiel malnova ŝelo de acero printempa.”

KOMENTARO KAJ TERMINOJ KLARIGATAJ

Etimologio Deveno de vorto. (PV).

Eŭfemio Dirmaniero por mildigi la krudecon de la ĝusta vorto: ”*senfina dormo*” estas eŭfemismo anstataŭ ”*morto*”. (PV).

Gramatika naturo Oni distingas inter vortoj apartenantaj al tri ĉefaj grupoj de vortradikoj gramatike devenigeblaj: la **substantiva** grupo, kies radikoj enhavas sencon de objekto, persono, aĵo, (*hund’*, *dom’*, *aer’*, *spirit’*), la **adjektiva** grupo, kies radikoj enhavas la sencon de kvalito, eco (*bon’*, *bel’*, *em’*, *abl’*), la **verba** grupo, kies vortoj havas la sencon de ago, esto, ado, (*kur’*, *skrib’*, *ekzist’*, *daŭr’*).

Homonimo Vorto, kiu havas la saman formon kiel alia, sed malsaman sencon: ekz. *ero* (elemento de objekto) kaj *ero* (jarkalkulo). (PV).

Indoeŭropa lingvofamilio Unu el la ĉefaj familioj de lingvoj. Ĝi enhavas en siaj diversaj grupoj la persan, sanskritan, grekan, latinan, francan, anglan, germanan, rusan k.a. lingvojn. Esperanto apartenas al la itala branĉo de la indoeŭropa lingvofamilio.

Katakresio Vorto, kiu alprenis sencon nelogikan al ĝia origina senco. Esperanto ne posedas multajn katakresojn ĝuste pro la postulo pri logiko en tiu

lingvo — tamen ĝi prunteprenis el naciaj lingvoj: Ekz. li skribis per *"fontoplumo"*, (*plumo* tie perdis sian originan sencon: korneca tubeto garnita per lanugo).

Metaforo Esprimmaniero laŭ kiu oni donas al iu vorto signifon alian ol ĝia propra, klarigebla per subkomprenita komparo (PV).

Neologismo Nova, antaŭe ne uzata vorto aŭ esprimo (PV).

Principo de *sufiĉo* Principo starigita de René de Saussure, bazita sur la gramatika naturo de la gramatike deriveblaj vortoj en esperanto kaj sur la regulo (11-a regulo de la fundamenta gramatiko esperanta), ke ankaŭ la finaĵoj same kiel la afiksoj estas memstaraj vortoj. La principo postulas, ke oni ne senbezone esprimu dufoje la saman ideon kiel ekz. en *sufiĉeco*, *komprenebleco*, kiuj enhavas superfluan adjektivan ideon de *ec'* jam ekzistantan en *sufiĉ'*, *eb'l'*, en *negrulo*, *laikulo*, kiuj ambaŭ havas duoblan esprimadon de substantiveco: *negro* kaj *ulo*, *laiko* kaj *ulo* — en *ekzistado*, *komencado* la agvorto *ado* nur estas necesa, se oni volas akcenti longan daŭron de la ago.

En 1913 la Lingva Akademio oficiale aprobis tiun principon kune kun la principo de neceso en la jena formo:

a) Principo de neceso: En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

b) Principo de sufîco: Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

Sintakso Parto de la gramatiko rilatanta al la konstruo de la frazoj, t. e. al la funkcio, reciprokaj rilatoj kaj aranĝo de la vortoj kaj propozicioj en la frazo. (PV).

Supino Verba formo en la latina gramatiko havanta substantivan karakteron.

PV Plena Vortaro

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-125-9